

# PERSONAJ KAJ FAMILIAJ INDIKOJ

## 1 >> Sinprezento, personaj indikoj, profesio de la ekzamenato

Mi estas *Koppány Abai*. *Koppány* estas mia persona nomo, kaj *Abai* estas mia familia nomo. En Hungario la familia nomo estas la unua, kaj la persona la dua. Tamen, kiam mi parolas fremdan lingvon, mi inversigas la ordon, ĉar mi konscias, ke por eksterlandanoj ofte estas malfacile diferencigi kiu estas kiu. Miaj hungaraj amikoj nomas min *Koppány*, ĝi estas prahungara vira nomo, sed por esperantistoj mi kutime prezentas min kiel Koĉjo. Estas malpli komplike por diri. La familian nomon „*Abai*“ mi ricevis laŭ la familia nomo de mia patro (tio estas la kutimo en Hungario), ĝi signifas „*devenanta de la urbo Aba*“. Mi naskiĝis en Budapeŝto la duan de Marto, 2002. Mi daŭre loĝas en Budapeŝto. Nun mi estas 19-jara. Mi estas fraŭlo. Mia adreso estas la strato *Ede*, numero 16, 5-a etaĝo, pordonumero 4. Mia telefonnumero estas +36 30 555 1234. Mi estas studento. Mi studas ekonomion en la urbo *Székesfehérvár*. Mi estas 180 centimetrojn alta, kaj 80 kilogramojn peza. Mi havas blondajn harojn kaj bluajn okulojn. Kelkaj eksterlandanoj diras, ke ili kredis, ke ĉiuj hungaroj estas brunuloj. Nu, oni ne lasu sin kondukti per stereotipoj. Mi legis ie, ke en Eŭropo ĝuste la hungara estas tiu nacio, kies anoj pleje diferencas genetike unu de la aliaj. Tio laŭ mi veras, ja ni multe malsimilas unu de la aliaj aspekto. Se temas pri miaj internaj ecoj, onidire mi estas saĝa kaj inteligenta – pardonu pro laŭdi min mem – mi esperas, ke mi povas konsenti kun tio, krome laŭ mia opinio mi estas sincera, pacienca kaj amikema persono. Se mi devus mencii mian malplej bonan econ, tio estus forgesemo. Iom honte, sed prave: mi jam kelkfoje perdis eĉ mian monujon!

## 2 >> Prezento de familianoj

Mia familio estas sufiĉe granda. Tio havas kaj avantaĝojn kaj malavantaĝojn. Estas bone scii, ke miaj proksimuloj ĉirkaŭas min. Mi ĉiam povas paroli kun iu. Mi ĉiam trovas helpon kiam mi bezonas ĝin. Mi povas viziti miajn malproksimajn familianojn dum la somertempo kaj mi sentas ke estas tiom da bonaj homoj ĉirkaŭ mi, kiuj amas min. Tamen ju pli granda estas la familio, des pli multe da kvereloj okazas. En nia familio neniam regas trankvilo. Ĉiam iu ofendiĝas je iu. Mi loĝas kun miaj gepatroj.

Mia patro nomiĝas *Lajos Abai*. Li estas kunordigisto en granda firmao. Li havas brunajn harojn kaj brunajn okulojn. Li estas sufiĉe alta, li estas diketa. Li havas barbon kaj lipharojn. Li portas sur si okulvitrojn, sed ne ĉiam. Li bezonas ilin por legi kaj por stiri aŭton. Li tute ne estas diskutema, li estas atentema kaj trankvila, tamen mi ne ŝatas, ke li ĉiam pridemandas min pri ĉio kaj ke li estas iom avara. Nu, idealaj gepatroj ja ne ekzistas.

La nomo de mia patrino estas *Anna Szabó*. Ŝi naskiĝis en la sama jaro kiel mia patro, sed tre malproksime de Budapeŝto, en la sud-okcidenta parto de nia lando. Kiam ŝi ne atentis pri sia lingvouzo, ŝi havas la akĉenton de tiu regiono. Por mi tio sonas kelkfoje amuze. Ŝi ektroviĝis en la ĉefurbo, ĉar ŝi ne konis siajn gepatrojn, ŝi estis orfino, kaj ŝi estis adoptita de orfejo en sia tria jaro fare de mirindaj gepatroj. Mi nomas ankaŭ ilin miaj geavoj kompreneble. Ŝi estas instruistino en Budapeŝto, kaj samtempe ŝi studas juron en la Universitato de Budapeŝto. Ja ŝi estas ege diligenta kaj lernema. Ŝi estas mezalta kaj maldika. Ŝi havas bluajn okulojn kaj blondajn harojn. Ŝi estas tre kara, kaj helpema persono. Ĉiuj niaj najbaroj kaj parencoj povas atesti tion. Mi ne ŝatas en ŝi, ke ŝi estas kelkfoje diskutema. Mi tre amas ŝin!

Mia fratino nomiĝas *Mária*, ŝi estas tre inteligenta. Krom studi, ŝi ankaŭ tre multe laboras kiel partatempa sekretario, pro tio ni ne renkontiĝas tro ofte. Tamen kiam finfine ni sukcesas renkontiĝi, ni tre ĝojas, kaj multe babilas. Ŝi loĝas kun sia edzo, mia bofrato, en urbetto en la ĉirkaŭaĵo de la ĉefurbo. Ili geedziĝis antaŭ du jaroj. La edzo havis jam antaŭe alian edzinon, sed ili ne eksgeedziĝis. Bedaŭrinde ŝi forpasis, kaj li vidviĝis. Tre malgajiga historio. Tamen nun ili kune tre feliĉas. Ili jam havas 2 infanojn, ili estas ĝemeloj. Mia fratino denove estas graveda, la bebeto naskiĝos post kvin monatoj.

La nomo de la patrino de mia patrino estas *Terézia*. Mi ofte vizitas ŝin, kaj mi klopodas multe helpi al ŝi. Ŝi havas grandan domon, ĉiam estas io por fari. Tio tute ne estas problemo por mi, intertempe ni ĉiam multe babilas kaj klaĉas. Mia avo jam forpasis. La patrino de mia patro bedaŭrinde same ne vivas. Mia avo de la flanko de mia patro nomiĝas *Lajos*. Li estis fajrobrigadano, nun li estas emerito sed li multe laboras hejme en kaj ĉirkaŭ la domo. Li havas grandan ĝardenon kun fruktoj kaj legomoj. Li hobia estas ankaŭ abelisto, li havas abelujojn kun abeloj, kiuj produktas mielon. Kiam ni vizitas lin, li ĉiam donas al ni multe da fruktoj, legomoj kaj mielo. Tian mielon oni ne povas trovi en la vendejoj!

### 3 >> Familiaj festoj, tradicioj

Tradicie la plej grandaj festoj en mia familio estas Pasko, Kristnasko kaj Silvestro. Mia familio ne estas religjema, tamen ni festas pro tradicio.

La tradicio en Hungario aspektas jene. Por Pasko la virinoj multe kuiras. London matene la virinoj kaj la knabinoj pretigas la tablon por atendi la virojn kaj la knabojn. La viroj kaj la knaboj ekiras al siaj konatinoj. Alveninte ĉe ilia loĝejo la viroj recitas tipan paskan poemon kaj petas permeson por akvumi la virinojn kaj knabinojn de la domo. Ili kutime ricevas permeson, do la viroj kaj knaboj akvumas simbolo la virinojn kaj knabinojn per parfumo, por ke ili „floru“ ankaŭ en la sekva jaro. Malofte, sed okazas, ke la akvumado signifas akvumegon kaj grandan kvanton da akvo. Tio estas la pli tradicia maniero, sed nuntempe tre malofte. Post tio ĉi, la virinoj kaj la knabinoj invitas la virojn kaj la knabojn al sia hejmo por doni al ili manĝaĵojn, trinkaĵojn, drinkaĵojn kaj ruĝan, pentritan ovon. Kelkfoje infanoj ricevas ankaŭ monon. Post la gastado la gastoj pluiras kaj la virinoj atendas la sekvajn homojn. En Budapeŝto ĉi tiu tradicio estas pli kaj pli malofte, nia familio festas nur per komuna matenmanĝo kun tradiciaj pladoj, kiel ŝinko kaj ovo.

La 31-an de Oktobro estas la anglosaksa Halovino, la 1-an de Novembro estas la Tago de Ĉiuj Sanktuloj, kaj la 2-an de Novembro estas la Tago de la Mortintoj. La anglodevena Halovino estas pli kaj pli populara ankaŭ en Hungario. Por junuloj estas organizitaj kutime ankaŭ festoj, kie oni devas surhavi vestaĵojn kaj ŝminkon de iu „timiga“ personaĵo, ekz. zombio, vampiro aŭ fantomo. En Hungario – ankoraŭ – ne ekzistas tiu kutimo de infanoj, kiu en Usono kaj Britio, ke infanoj kun korbetoj iras de domo al domo por ricevi dolĉaĵojn. Tradicie en Hungario ni iras la 1-an de Novembro al la tombejo por viziti la tombojn de niaj mortintaj familianoj. Oni kutime metas freŝajn florojn sur la tombojn. Oni surmetas ankaŭ kandelojn kaj meĉaĵojn. Oni purigas la ĉirkaŭaĵon de la tombo. Oni kutimas stari kelkajn minutojn silente ĉe la tomboj por rememori pri siaj karaj forpasintoj.

Mia plej ŝatata festo estas Kristnasko, ĉar mia familio estas kune tiam. La 24-an de Decembro vespere ni kune manĝas. La vespermanĝon mia patrino kutimas pretigi. Ĝenerale ni manĝas fiŝ-supon kaj poste gratenitajn viandaĵojn kun termpompureo kaj salato. Post la manĝo ni iras al la kristarbo, kien ni jam antaŭe metis la donacojn. La infanoj de mia fratino, *Léna* kaj *Barnabás*, kredas, ke la donacojn alportis Jesueto. En Hungario la donacojn ne alportas Sankta Nikolao. Antaŭ ol malfermi la donacojn, la infanoj kantas ion kristnaskan, poste ni ĉiuj kune la kanton *Anĝel' el Ĉiel'* kaj intertempe ni bruligas stelŝprucilojn.

Tradicie mia familio estas kune ankaŭ dum Silvestro. Ni invitas la fratinojn kaj la edzojn de la fratino de mia patro al nia hejmo. Ili venas kun niaj gekuzoj. La pli maljuna generacio kutime drinkas, babilas kaj ludas kartojn atendante la noktomezon. La infanoj ĝojas ĉi-tage ankaŭ pro tio, ke ili ne devas iri frue dormi. La plej malgrandaj kompreneble ne

eltenas kaj endormiĝas antaŭ noktomezo. Mi, kiel 19-jarulo, jam ne tiom ĝuas festi Silvestron kun la familio. Mi kutime iras kun miaj geamikoj drinki kaj festi kune, ni ofte ankaŭ dancas. Ĉiuj atendas noktomezon. Kiam la horloĝo montras la 12-an, ĉiuj aŭskultas en kompleta silento la hungaran himnon per la televido aŭ radio. Kiam la hungara himno finiĝas, ĉiuj ekkrias „*Felícian Novan Jaron*“ kaj ĉiuj deziras persone ĉion bonan al la aliaj por la nova jaro. Post noktomezo mi kaj miaj amikoj festas ankoraŭ dum kelkaj horoj kaj ni rigardas la fajraĵojn ekstere.

Ni festas kaj la naskiĝtagojn kaj la nomotagojn, tamen ĉefe de la plej malgrandaj. Oftas pro tiuj okazoj komuna tagmanĝo de la familianoj kaj la festato ricevas donacojn. La pli malgrandaj vestaĵojn, librojn aŭ ludilojn, la pli grandaj poŝmonon.

Krome en nia lando kompreneble estas ankaŭ tradiciaj ŝtataj festoj. La unua en la jaro estas la 15-a de Marto, kiam ni primemoras la hungaran revolucion kaj la militon de libereco, kiu daŭris de 1848 ĝis 1849. Ĝi estas feria tago. Kutime estas specialaj programoj en la televido kaj festparolas la hungara ĉefministro. Poste sekvas *la tago de Sankta Stefano*, la 20-a de Aŭgusto. Ĝi nomiĝas ankaŭ *Festo de la landofondo*. Ĝi fakte estas festo ekestinta je la memoro de la sanktigo de Stefano la Unua, okazinta ĝuste en tiu tago en la jaro 1083. Verŝajne ankaŭ pro tio ke tiu ĉi tago estas somere, kaj pro tio ke estas ferioj, ĉi-tage estas organizataj la plej multaj eksteraj programoj tra la tuta lando. En Budapeŝto ĉi-tage estas videbla ankaŭ la plej granda spektaklo de fajraĵo de la jaro. La lasta libertago pro nacia festo en Hungario estas la 23-a de Oktobro je la memoro de la revolucio kaj liberbatalo en 1956 kontraŭ la stalinisma teroro kaj sovetia okupo.

### 4 >> Planoj, sopiroj

Mi havas ses informadikajn ekzamenojn de Eŭropa Komputila Atestilaro (ECDL), sed mi volas akiri ankaŭ la sepan. Preskaŭ ĉiuj dungantoj nuntempe atendas de siaj dungatoj, ke ili posedu meznivelajn komputilajn sciojn. Mi volas akiri ankaŭ la skriban lingvan atestilon pri la kono de la angla. Mi jam havas atestilon pri la parola ekzameno. Kompreneble mi ankaŭ tre volus havi lingvokonatan atestilon pri Esperanto.

Mi ankoraŭ ne laboras, sed mi volis tiel elekti mian estontan profesion, ke mi ĝuu ĝin kaj ĝi ankaŭ estu profitodona. Kiam mi fine iĝos ekonomikisto, mi pensas, ke mi tre ŝatos ĝin, ĉar mi ŝatas lerni matematikon kaj logikon, mi ĝuas labori per nombroj. Unue mi ŝatus labori ĉe granda firmao, prefere internacia, por ekhavi spertojn pri ekonomio kaj ankaŭ en lingvoj. Mia imago pri miaj postaj planoj devas disvolviĝi ankoraŭ, sed mi supozas, ke mi fondos mian propran firmaon kun ekonomiaj servoj por aliaj firmaoj.

## DEMANDOJ



1. Bonvolu prezenti vin!
2. Kio estas via nomo?
3. Ĉu vi povas rakonti pri via nomo?  
De kie ĝi devenas, kion ĝi signifas ktp.
4. Kie vi naskiĝis?
5. Kiam vi naskiĝis?
6. Kiom da jaroj vi havas?
7. De kie vi venas?
8. Kion vi faras en la vivo?
9. Kio estas via profesio?
10. Kie vi loĝas?
11. Kio estas via adreso?
12. Kio estas via telefonnumero?
13. Kia vi estas?
14. Kun kiu vi loĝas?
15. Kiom granda estas via familio?
16. Ĉu laŭ vi estas bone havi grandan familion?
17. Kion vi faras, kiam via familio estas kune?
18. Ĉu vi havas gefratojn? Rakontu pri ili!
19. Kiaj estas laŭ vi la idealaj gepatroj?
20. Kia estas la kontakto inter vi kaj viaj gefratoj?
21. Kia estas via patr(in)o?
22. Kiel vi priskribus lin / ŝin?
23. Kiel via patr(in)o aspektas?
24. Kio estas la profesio de via patr(in)o?
25. Kie loĝas viaj parencoj?
26. Prezentu viajn geavojn!
27. Kiom ofte vi vizitas viajn geavojn?
28. Kiuj estas la tipaj festoj de via lando?
29. Kio okazas dum tiuj festoj?
30. Ĉu vi festas la nomotagojn?
31. Kiel vi festas vian naskiĝtagon?
32. Kiujn festojn vi kutimas festi kun via familio?
33. Kiom ofte kaj je kiuj okazoj renkontiĝas viaj familianoj?
34. Kiu estas via plej ŝatata festo? Kial?
35. Kion vi faras dum Pasko / Halovino / la Tago de Mortintoj / Kristnasko / Silvestro / iu nacia tago de via lando?
36. Kiuj estas viaj planoj / sopiroj rilate al via estonteco? Kiel vi planas akiri / plenumi ilin?

## VORTLISTO.....

<b>Familio, amikoj</b> .....	angora .....	sentimentala .....
amiko .....	atentema .....	serioza .....
bapto- .....	avara .....	silentema .....
bebo .....	ĉarma .....	simpatia .....
bofil(in)o .....	diligenta .....	simpla .....
bofrat(in)o .....	dormema .....	sincera .....
bopatr(in)o .....	egoisma .....	sprita .....
disiĝi de iu .....	envia .....	stulta .....
edz(in)o .....	feliĉa .....	ŝanĝiĝema .....
edz(in)iĝi al iu / kun iu .....	fidela .....	timema .....
eksedz(in)iĝi de iu .....	fiera .....	tolerema .....
eksedz(in)o .....	freneza .....	<b>Eksteraj ecoj</b> .....
eksgaedziĝi .....	gaja .....	alloga .....
familiano .....	grava .....	alta .....
fil(in)o .....	hastema .....	bela .....
fianĉ(in)o .....	helpema, helpopreta .....	bonodora .....
frat(in)o .....	hipokrita .....	bukla .....
fraŭl(in)o .....	honesta .....	delikata .....
geedziĝi .....	impertinenta .....	dika .....
ĝemeloj .....	inteligenta .....	eleganta .....
knabo(in)o .....	intima .....	fiodora .....
konato .....	jaluzo .....	forta .....
koramik(in)o .....	klera, kultura .....	gracia .....
kuratoro .....	konscia .....	granda .....
kuz(in)o .....	kuraĝa .....	handikapita .....
nep(in)o .....	laca .....	hela .....
nev(in)o .....	memstara .....	juna .....
onkl(in)o .....	modesta .....	kalva .....
orf(in)o .....	naiva .....	kurba .....
paĉjo .....	obeema .....	lama .....
panjo .....	obstina .....	larĝa .....
parenco .....	pacienca .....	longa .....
persono .....	parolema .....	malalta .....
praav(in)o .....	perforta .....	malbela .....
prapraav(in)o .....	pigra .....	maldika .....
vidv(in)o .....	populara .....	malforta .....
vir(in)o .....	riĉa .....	malgranda .....
<b>Karaktero</b> .....	ruza .....	malhela .....
afabla .....	saĝa .....	maljuna .....
amika .....	sentema .....	mallarĝa .....

mallonga	festotago	lernanto
malpura	kandelo	lignajisto
matura	karnavalo	murfarbisto
muskola	kristarbo	muzikisto
muta	Kristnasko	oficisto
ondumita	nacia festo	pastro
pura	naskiĝtago	pentristo
rekta	nomotago	poeto
straba	Pasko	policisto
surda	Pentekosto	poŝtisto
svelta	Sankta Nikolao	purigisto
<b>Korpopartoj</b>	Silvestro	raportisto
barbo	ŝtatfondo	redaktoro
figuro	stelŝprucilo	senlaborulo
haroj, hararo	<b>Profesioj</b>	ŝoforo
haŭto	abelisto	soldato
lipharoj	aktoro	sportisto
okulo	apotekisto	studento
vanĝharoj	arkitekto	ŝuisto
vango	bakisto	tajlisto, tajloro
vizaĝo	buĉisto	vendisto
<b>Priskribado</b>	ĉarpentisto	verkisto
aspekti	ĉiĉerono	<b>Aliaj</b>
baptonomo	elektristo	adopti iun
karaktero	emerito, pensiulo	atestilo
karesnomo	fajroestingisto	ĉirkaŭi ion / iun
aĝo	fervojisto	koni ion / iun
deveni de ie	fotisto	kvereli kun iu pri io
diferenci de io / de iu; malsimili	frizisto	laŭdi ion / iun
de io / de iu	ĝardenisto	ofendiĝi je iu
familia nomo	gazetvendisto	reciti poemon
persona nomo	infanvartisto	
simili al io / al iu	inĝeniero	
trajto	instruisto	
<b>Festoj</b>	jurnalisto	
advento	kantisto	
Avo Frosto	kasisto	
donaci ion al iu	kelnero	
donaco	kosmetikisto	
fajraĵo	kuiristo	
festo	kuracisto	
ferio	legomvendisto	

## Notoj